

## & Deveno de la virino:

< Rekante 22 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961) kun noto "Fabelo versimila". Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:41> ((o;So /dodo; dore miido;do Tido Tido TiSo La La;So dodo dore mifa so mi;mi SoSo SoSo mire do do

(#Rekantaĵe: o;So dodo dore mido; Tido Tido TiSo La La;So dodo dore mifa so mi;mi SoSo SoSo mire do Tido La Fa So))×7 )+

### (&Strofoj:

'1 Pra-Evo, ; laŭ biblio, ; estiĝis el Adama ripo. ; Sed plene mankas la klarigo, ; kial ŝi glitis el la tipo!

(×:; **Rakontas mi fabelon ; versimilan se vi kredas ; kaj dum ni paŝas en la danco ; aŭskultu kion mi rivelas el mia kor'.**)

'2 Mi tiam ; ŝtel-observis ; la tutan kreo-proceduron: ; por povi la ateston doni, ; min kaŝis en Eburan Turon. ....

'3 Kaj Dio ; tiun tagon ; preparis fornon por la bako, ; kaj antaŭ "Estu!" li ankoraŭ ; en pipon ŝtopis la tabakon.

.....

'4 Sed hundo, ; best' avida, ; alkuris tien laŭ la flaro, ; la ripon - ŝmac! kaj jam peliĝis ; kun akiraĵo post la baron! .....

'5 Nu, Dio ; persekutis ; tuj la ŝteliston, malgraŭ aĝo. ; Sed vane: en la mano restis ; kaptita hunda - posttrenaĵo... ..

'6 Kaj tiam ; kara Dio, ; la Ĉiopova, sen la ostoj ; Adama, kreis la virinon ; finfine el la hunda vosto. ....

'7 Pro tio ; la kreaĵo ; farita el pendolo vila ; (pri kiu temas, vi ja scias), ; de ĉiam estas maltrankvila! .....